LA ANĜEVA FOLIO N° 27 **MAJO 2013**

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

# LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE

La date à retenir

**MERCREDI 22 MAI**

**Présentation illustrée de Andreï Grigoriev**

# LA VIE EN SIBÉRIE DE NOS JOURS

**20h - Salle Mot à Mot - Centre Jean Vilar, Rue Henri Bergson La Roseraie - ANGERS**

## Entuziasmo estas kvazaŭ nutraĵo por la cerbo

Etaj infanoj lernas tre facile ĉar ili entuziasmiĝas almenaŭ 50-foje dum la tago. Novaj nervaj konektoj tamen formiĝas tute sendepende de la aĝo.
"Nia cerbo ĉiam denove adaptiĝas al la maniero kiel kaj kiucele ni uzas ĝin kun ĝojo kaj entuziasmo". Tion skribas la germana cerbesploristo Gerald Hüther pri la temo "La cerbo ne rustiĝas ..."
Se io feliĉigas nin, la emociaj centroj en la pli profundaj areoj de la cerbo aktiviĝas. Tie troviĝas grupoj de nervoĉeloj kun longaj alpendaĵoj kiuj atingas ĉiujn aliajn areojn de la cerbo. Simple dirite: "Ĉiam kiam oni povas entuziasmiĝi pri io, disĵetiĝas nutraĵo en la cerbo kiu en la stato de entuziasmo kreskigas la tre intense uzatajn neŭronajn retojn". Etaj infanoj entuziasmiĝas 50-foje dum tago, tial ili povas ankaŭ lerni tiom.
Nur malmultaj homoj sukcesas konservi sian denaskan ĝojon pri malkovroj kaj la emon formi sian medion ĝis alta aĝo. "De ili ni devas lerni, ilin ni devus demandi kiel ili sukcesis estigi la kontakton en la cerbo kiu malebligas la rustiĝon", diras Hüther.
Esploristoj en Göttingen nun trovis tiun kontakton por la lernkapablo. Jam je la komenco de la dua vivoduono ĝi aktiviĝas. "Modifita interago inter medio kaj genomo kondukas al perdo de la lernokapablo en alta aĝo", tiel priskribas tion la esploristoj.
Hüther tamen priskribas kiel eblas konservi siajn mensajn kapablojn en alta aĝo. Temas pri sintenoj, konvinkoj kiuj malhelpas la rustiĝon de la cerbo. La sekvaj konsiloj helpas konservi la mensajn kapablojn:
- Manĝu malpli kaj pripensu zorgeme kion vi manĝas.
- Moviĝu pli kaj esploru la eblecojn regi vian korpon.
- Entuziasmiĝu pri la bunteco kaj beleco de la mondo.
- Ne permesu al vi perdi la ĝojon pri cerbumado, malkovrado, lernado kaj pluevoluado.



- Ne orientiĝu laŭ tio kion aliaj trovas grava, sed faru tion kio bonfartigas vin.
- Ne forlasu la serĉadon pri la senco de la vivo.
- Aranĝu la rilatojn al aliaj homoj tiel, ke kune kun ili vi povas kreski ekster la proprajn limojn.
Estas neniam tro malfrue: novaj nervaj konektoj formiĝas tute sendepende de la aĝo, do ĉiu povas partopreni, ĉar la rutinon de la ĉiutago ni ĉiuj havas. Oni povas kaj oni devus stimuli la cerbon per ĉiuj kvin sensoj, plej bone eĉ samtempe, ekzemple palpi kaj flari kaj gustumi. Gravas ankaŭ ke oni konservas sian motiviĝon kaj ne rezignas.

*Fonto : Retradio*

## *L'enthousiame est comme un aliment pour le cerveau*

Les petits enfants apprennent très facilement car il s'enthousiasment au moins 50 fois pendant la journée. Cependant de nouvelles connexions nerveuses se forment indépendamment de l'âge. "Notre cerveau s'adapte toujours selon la manière dont on l'utilise avec joie et enthousiasme. C'est ce qu'écrit le chercheur allemand Gérald Hüther sur le thème "Le cerveau ne rouille pas...".
Si quelque chose nous rend heureux, les centres émotionnels dans la plus profonde zone du cerveau s'activent. Là se trouvent de longues grappes de cellules nerveuses qui atteignent toutes les autres zones du cerveau. Pour dire simplement : chaque fois que l'on s'enthousiasme pour quelque chose, de "l'engrais" se répand dans le cerveau qui, alors, fait se développer des réseaux de neurones. Les petits enfants s'enthousiasment 50 fois pendant la journée, c'est pourquoi ils peuvent autant apprendre.
Seulement peu de gens parviennent à conserver jusqu'à un âge avancé leur enthousiasme originel pour la découverte et l'envie de donner forme à leur environnement. "Nous devons apprendre d'eux, nous devons leur demander comment ils réussissent à établir dans le cerveau le contact qui empêche l'oxydation", dit Hüther.
Des chercheurs à Göttingen ont maintenant trouvé ce contact pour la capacité d'apprendre. Il se désactive déjà dès le commencement de la deuxième partie de la vie. "L'interaction modifiée entre l'environnement et le génome conduit à la perte de la capacité d'apprendre à un âge avancé", c'est ce que décrivent les chercheurs.
Cependant Hüther explique comment il est possible de garder ses capacités mentales à un âge avancé. Il s'agit d'attitudes, de convictions qui empêchent l'oxydation du cerveau, Les conseils suivants aident à conserver nos capacités mentales :
- mangez moins et réfléchissez attentivement à ce que vous mangez.
- bougez plus et explorez les possibilités de maîtriser votre corps.
- enthousiasmez-vous de la richesse et de la beauté du monde.
- ne laissez pas s'éteindre la joie de découvrir, d'apprendre et d'évoluer.
- ne suivez pas ce que d'autres trouvent important, mais faites ce qui vous fait du bien.
- n'abandonnez pas la recherche du sens de la vie.
- établissez votre relation avec les gens de sorte qu'ensemble vous pouvez progresser au-delà de vos propres limites.
Il n'est jamais trop tard : de nouvelles connexions nerveuses se forment tout à fait indépendamment de l'âge, donc chacun peut participer. On peut et on doit stimuler le cerveau par les 5 sens, et même mieux en même temps, par exemple toucher, sentir, et goûter. Il est important également de ne pas se résigner et de conserver sa motivation .

*Source : Retradio*

LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE





# La rusa ĵurnalisto Andrej Grigorjev vizitos nin merkredon la 22-an de majo

Andrej Grigorjev estas ĵurnalisto, kiu redaktas por la ĉiusemajna ruslingva gazeto *Krasnojarska Fervojisto*. Entuziasma 49-jaraĝa Esperantisto, Andrej Grigorjev ofte partoprenas diversajn E-aranĝojn en eks-sovetiaj landoj sed neniam vojaĝis en okcidenta Eŭropo. En Jalto, okaze de la 85-a kongreso de SAT en aŭgusto 2012, li jam prezentis sian por vi aktualigotan prelegon. Profesia komunikisto, Andrej Grigorjev malferme parolas kaj senĝene respondas al ĉiaj demandoj pri la nuntempaj vivkondiĉoj en Siberio sed ankaŭ ekzemple pri la krasnojarska fervojista sindikato Rosprofzel.

Vi estas invitita por bonvenigi kaj, se vi deziras, gvidi lin en Anĝevo merkredon la 22-an de majo.

Vidu ĉi-flanke la informojn pri lia prezentado de la "*Nuntempa vivo en Siberio*".

## Le journaliste russe Andreï Grigoriev nous rendra visite le mercredi 22 mai

Andreï Grigoriev est un journaliste qui travaille pour le magazine hebdomadaire russe *"Le cheminot de Krasnoïarsk"*.

Andreï Grigoriev, enthousiaste espérantiste de 49 ans, participe souvent à diverses manifestations espérantistes dans l'ex-Union Soviétique, mais n'a jamais voyagé en Europe occidentale. A Yalta, à l'occasion du 85e congrès de SAT en août 2012, il a déjà présenté sa conférence qui pour nous sera actualisée.

Professionnel de la communication, Andreï Grigoriev parle ouvertement et répond sans gêne à toute question sur la vie en Sibérie de nos jours, mais aussi par exemple sur le syndicat cheminot de Krasnoïarsk, Rosprofzel.

Vous êtes invités à accueillir Andreï et si vous le désirez lui faire visiter la ville d'Angers le mercredi 22 mai. Voyez ci-dessous les informations sur la présentation de "*La vie en Sibérie de nos jours*".



# Sen reklamo, rapide Esperanto mortus !

Rezulte de pagita reklam-kampanjo de la "Esperanto-Centro Eventoj" en 2012 aperis Esperanto-reklamoj en la hungarlingva interreto pli ol 1,7 milion-foje.

Esperanto rapide mortus sen reklamo ! En la hodiaŭa mondo nure la pozitivaj ecoj de la varoj - ankaŭ de Esperanto - ne sufiĉas por ke ili estu sukcesaj. Oni devas konigi, reklami, "vendi" ilin en la merkato. Unu el la eblaj kaj efikaj kanaloj estas reklamado en interreto. Bedaŭrinde malofte mi vidas Esperantajn reklamojn en la reto, kaj mi ne memoras, ankoraŭ ne legis raportojn pri tia agado.

Ĉe la Esperanto-Centro Eventoj jam de 2009 ni okupiĝas pri interreta reklamado, uzante ĉefe du servojn: AdWords de Google kaj alia hungara servo "Etarget", simila al AdWords.

En la praktiko ĉiuj renkontiĝas kun la 2 ĉefaj reklamaj kanaloj de Google:

La unua el ili estas la dum-serĉaj reklamoj, kiam super aŭ apud la trafoj kun hela oranĝa fono aperas "sponsoritaj rezultoj", t.e. pagitaj reklamoj. Per tiu maniero oni povas aperigi sian retejan adreson en la unua paĝo de la Google-serĉoj, tiel allogante vizitantojn.

La alia kanalo estas reklamblokoj, kies enhavo rekte ligiĝas al la cetera enhavo de la koncerna retpaĝo. Per tiu vojo ekzemple, se en la retpaĝa artikolo aperas la esprimo "internacia lingvo" aŭ ekz. "instruado de fremdaj lingvoj" - en la apuda reklambloko povas aperi reklamo pri Esperanto.

En la jaro 2012 ni elspezis 255.000 forintojn (867€) por interreta reklamado ĉe Google AdWords kaj 127.000 forintojn (432€) por Etarget, do sume 382.000 forintojn (ĉ 1300€). Tiu sumo egalas al 2-3 oble la monata averaĝa neta salajro en Hungario. La elspezita sumo de 255.000 forintoj ĉe Google AdWords rezultigis aperon de niaj reklamoj 1.776.000 foje, sekve de kio pli ol 15 mil homoj alklakis, kaj vizitis niajn retejojn www.eszperanto.hu kaj www.eszperanto-online.hu

La reklamkampanjo inkluzivis 5 ĉefajn projektojn, kaj estas geografie limigitaj al areo de Hungario. Tio signifas, ke ili ne videblas eksterlande, ili aperas nur por komputilaj uzantoj, situantaj en Hungario.

Nia plej granda projekto titoliĝas "Esperanto estas bona afero!" kaj tekstas: "www.eszperanto.hu - Lernolibroj, kursoj, lingvoekzameno - vojaĝado, eksterlandanoj, travivaĵoj, sukceso!" – Tiu ĉi reklamteksto en la pasinta jaro aperis 1.1 milion-foje, kaj 5933 homoj klakis por rekte ekscii pli en nia retejo. (Oni konsciu, ke la ĉefa celo de tiu reklamkampanjo NE estas rekte inviti homojn, ĝia tasko per la ripeta aperigo estas pezigi, encerbigi la koncepton, ke "Esperanto estas bona afero !".




Krom tiu supra reklamo ni havis ankaŭ aliajn projektojn, por reklami niajn lingvokursojn tradiciajn kaj interretajn. La supre indikitaj ciferoj montras la elspezojn ĉe Fondaĵo Esperanto, kaj ne inkluzivas tiujn de nia loka E-Asocio, nek de nia firmao Lingvo-Studio.

Kompreneble ne nur ni okupiĝas pri reklamado. Ekzistas pluraj hungariaj instruistoj kaj E-lernejoj kiuj per relative malgrandaj sumoj reklamadas siajn E-kursojn, sed laŭ mia scio neniu alia elspezas por ĝenerala reklamado de Esperanto.

Ankaŭ en internacia nivelo mi ne ofte renkontiĝas kun Esperanto-reklamoj. Jes, oni renkontas reklamojn de Lernu – laŭ mia scio E@I ne pagas por tio, antaŭ multaj jaroj ili ricevis tiun reklameblon kiel senpaga donaco de tiutempa kampanjo de Google al senprofita agado – kaj nur foj-foje mi renkontiĝas kun hazardaj, kelktagaj provoj de Esperanto-societoj.

Mi ne scias, ĉu tiu nevideblo de Esperanto-reklamoj okazas pro ilia neekzisto, aŭ pro ilia geografia limigo. Volonte mi legus pri la spertoj de aliaj esperantistaj reklam-prizorgantoj.

*Szilvási László*

## Sans publicité, l'espéranto mourrait rapidement !

Plus de 1,7 million de fois en 2012, des publicités espérantistes sont apparues sur l'internet hongrois suite à la campagne publicitaire de "Esperanto-Centro Eventoj".

L'espéranto mourrait rapidement sans publicité ! Dans le monde d'aujourd'hui, les qualités des marchandises - de l'espéranto aussi - ne suffisent pas pour qu'elles rencontrent le succès. On doit les faire connaître, les promouvoir, les "vendre" sur le marché. Un des possibles canaux efficaces est la publicité sur internet. Malheureusement je vois rarement des publicités sur le net, et je ne me souviens pas avoir lu de reportage sur ce type d'action.

Depuis 2009 au Centre Esperanto Eventoj, nous nous préoccupons de promotion sur internet en utilisant principalement 2 services : "AdWords" de Google et un autre serveur hongrois, "Etarget", similaire à AdWords. En pratique tout se trouve sur les 2 principaux canaux publicitaires de Google :

Le premier est la publicité pendant la recherche, quand apparaît "résultats sponsorisés" avec un fond orange clair au-dessus ou à côté de la page. De cette manière on peut faire apparaître son adresse internet sur la première page de Google, et attirer de cette façon les visiteurs.

L'autre canal est les publicités dont le contenu est directement lié à celui de la page concernée. Par exemple, si sur une page apparaît l'expression "langue internationale", ou "enseignement de langues étrangères", il peut apparaître une réclame pour l'espéranto. En 2012 nous avons dépensé 255.000 forints (867€) pour la publicité espérantiste sur Google AdWords et 127.000 forints (432€) sur Etarget pour un total de 382.000 forints (env.1300€). Cette somme est égale à 2-3 mois de salaire net moyen en Hongrie.

La somme dépensée sur Google AdWords a permis le passage de nos publicités 1.776.000 fois, suivi de plus de 15000 visiteurs qui visitèrent nos sites www.eszperanto.hu et www.eszperanto-online.hu. La campagne publicitaire a inclus 5 principaux projets, limités au périmètre hongrois. Cela signifie qu'ils ne sont pas visibles à l'étranger et apparaissent seulement aux utilisateurs d'internet situés en Hongrie.

Notre plus grand projet s'intitule "l'espéranto est une bonne affaire ! " suivi du texte : www.eszperanto.hu - livres d'initiation, cours, examens, voyages, étrangers, succès !

Ce texte-ci apparut l'année dernière 1,1 million de fois et 5933 visiteurs cliquèrent pour en savoir plus sur notre site. On a conscience que le but principal de cette campagne promotionnelle n'est pas directement d'inviter des gens. Sa tâche est d'inculquer le concept, par apparitions répétées, que "l'espéranto est une bonne affaire !". En plus de cette publicité, nous avions aussi d'autres projets pour promouvoir nos cours traditionnels et par internet. Les chiffres cités plus haut montrent les dépenses de la Fondation Espéranto et ne comprennent pas celles de notre association locale ni celles de notre entreprise Lingvo-Studio. Naturellement on ne s'occupe pas seulement de publicité. Il y a plusieurs enseignants hongrois et écoles espérantistes qui font la promotion de leurs cours d'espéranto pour un coût relativement faible mais à ma connaissance aucune autre dépense n'est faite pour la promotion globale de l'espéranto.

Egalement au niveau international, je ne rencontre pas souvent de publicité pour l'espéranto. On rencontre certes les publicités de Lernu - selon moi E@I ne paie pas pour cela, il y a de nombreuses années ils ont obtenu ce cadeau de Google comme action bénévole - et je rencontre seulement de temps en temps des essais de quelques jours de sociétés espérantistes. Je ne sais pas si cette non-visibilité de publicités espérantistes est due à leur absence ou à leur limitation géographique. J'aimerais connaître d'autres expériences de promotion de l'espéranto.

*Szilvási László*



*Metabjeo : neĝa pejzaĝo antaŭ la kongresejo*

# 68-a kongreso de SAT-Amikaro en Metabjeo (Ĵuraso)

Inter la 30-a de marto kaj la 2-a de aprilo okazis en Metabjeo (departemento Doubs) la 68-a kongreso de la esperanta organizaĵo SAT-Amikaro. Metabjeo situas 18 km for de Pontarlier kaj nur 4 km for de la svisa limo, tra verdpejzaĝo (alteco inter 930 kaj 1420 metroj).
Cento da personoj retroviĝis, en la tre bela feriejo "Azureva" por multaj aktivaĵoj por multaj aktivaĵoj rilatantaj al Esperanto-movado. La agado de Mirejo (Mireille Grosjean) estis elstara, ĉu pri la akceptado, ĉu dum akompanadoj kaj ekskursaj tradukoj, aŭ por prezentadoj de prelegantoj kaj artistoj.
Unu prelego, inter aliaj, allogis propran atenton de multaj kongresanoj. Temis pri "la elekto kaj la rajto digne morti" sekvita de libera debato, kun konkretaj demandoj, en kvieta etoso, respekto-plena al ĉiu opinio.Inter la proponitaj spektakloj, ni ĉeestis la Esperantajn koncertojn de Manuel (Italio), Anjo (Budapeŝto), kaj Jolane siaflanke prezentis repertuaron ambaŭ france kaj Esperante. La koruso Interkant' prezentis Esperante sian adaptadon kaj enscenigon de la opero "Karmen" de Bizet .
La kongresa etoso estis agrabla, en ege bonhumoro, interalie la restoracia dungitaro (ni dankas ilin por ilia kompliceco kiu ankaŭ kontribuis al la sukceso de tiu kongreso). La neĝo ankaŭ estis nia komplico dum la sabata nokto de la 30-a, per blanka kovrado de la tuta vilaĝo. Ĝi donis al ni senmakulan vekiĝon (do fotoj por ĉiuj, etaj promenadoj kaj neĝbuletoj por kelkaj). La proponintaj ekskursoj estis historie riĉaj, kun bonaj profesiaj lokaj ĉiĉeronoj.

**Fort de Joux vizito :**
Tiu fortikaĵo kiu superas la montaron


*Doganisto de Saugeais kun eks-doganisto de la grupo*


*La flago de Saugeais*

*Ĉi sube, la partoprenantoj de la kongreso*




## 68e congrès de SAT-Amikaro à Métabief (Jura)

Du 30 mars au 2 avril dernier a eu lieu à Métabief (Doubs) le 68ème congrès de l'organisation espérantiste SAT-Amikaro. Métabief se situe à 18 km de Pontarlier et à seulement 4 km de la frontière suisse, dans un paysage de verdure (altitude de 930 à 1420 m).
Une centaine de personnes se sont retrouvées dans le très beau centre de vacances Azureva pour de multiples activités autour de l'espéranto. Les prestations de Mirejo (Mireille Grosjean) ont été remarquables tant pour l'accueil, l'accompagnement et la traduction lors des visites, que pour les présentations des conférenciers et des artistes. Une conférence a retenu l'attention et le souffle de nombreux congressistes. Elle avait pour thème "le choix et le droit à mourir" suivi d'un débat très libre, avec des questions concrètes, dans un climat serein et respectueux des opinions formulées par chacun.
Parmi les spectacles proposés, nous avons pu assister aux concerts de chants en espéranto de Manuel (Italie), Anjo (Budapest). Jolane, quant à elle, nous proposa un répertoire en français et en espéranto. Le chœur inter-régional Interkant' présenta son adaptation et sa mise en scène de l'opéra "Carmen" de Bizet, en espéranto.

L'ambiance du congrès était agréable, de franche bonne humeur, y compris de la part du personnel de restauration (nous les remercions pour leur complicité qui a contribué aussi au succès de ce congrès). La neige aussi fut notre complice durant la nuit du samedi 30, recouvrant le village d'un blanc manteau pour nous offrir au réveil une beauté immaculée (photos pour tous, petites promenades et boules de neige pour d'autres !).

Les excursions proposées étaient riches d'histoire, avec de très bons guides locaux.
Entre autres, la visite du Fort de Joux : fortification qui se trouve dans une cluse à un croisement de voies, entre Pontarlier et Jougne. Elle domine la montagne. Ce fut un lieu de refoulement des colères par emprisonnement des rebelles (par ex : Toussaint Louverture...).

### L'état du Saugeais, entre France et Suisse

Il est né en 1947, sur le ton d'une plaisanterie entre le préfet du Doubs et Georges Pourchet, le patron de

ĉirkaŭan, troviĝas ĉe vojkruciĝo en kluzo, inter Pontarlier kaj Jougne. Oni uzis ĝin kiel "sufokejon" per malliberado de ribelantoj (ekz : Toussaint Louverture...)

## La ŝtato de Saugeais inter Francio kaj Svislando

Ĝi naskiĝis en 1947 dum ŝerco inter la prefekto de departemento Doubs kaj Georges Pourchet, estro de la Gastejo de la Abat-monaĥejo "Montbenoît". La teritorio de Saugeais estis koloniita kaj senveprigita de la svisaj monaĥoj, helpitaj de savojajn kamparanojn kaj manlaboristojn, inter la 12-a kaj la 15-a jarcentoj. Ĝi entenas 11 komunumojn en la franca departemento Doubs (areo : 127 $km^2$ - 5000 loĝantoj).
Ĝi estas memproklamita ŝtato, eta libera respubliko, kies ĉefurbo estas la vilaĝo de Montbenoît kun Sinjorino Georgette Bertin-Pourchet kiel prezidento. Tiu folklora respubliko ĝuas la samajn atribuojn kiel vera respubliko : proprajn doganojn, flagon, himnon (do, ni ne povis eviti la identigan kontrolon kaj la priserĉadon, ĉefe la palpado de suroj ĉe la virinoj... frenezaj momentoj en la buso) !

## Svislando

Pieda transiro de la landlimo apud la vilaĝoj "Villers-Le-Lac (Francio) kaj "Les Brenets" (Svislando).
Vizitado de la subteraj akvomuelejoj (unikaj en Eŭropo), ĉe montpasejo "Col des Roches", 30 metrojn subtere) kun temperaturo de 7°C.
Valo de "La Brévine" ankaŭ nomata "Svisa Siberio". En tiu regiono, la temperaturo povas atingi, vintre, ĝis - 40°C.

l'Auberge de l'Abbaye de Montbenoît. Le territoire du Saugeais a été colonisé et défriché par des moines suisses aidés de paysans et d'artisans savoyards, entre les XIIème et XVème siècles.
Il est formé de 11 communes du Doubs (surface : 127 $km^2$ - 5000 habitants).
C'est un état autoproclamé, une petite république libre dont la capitale est le village de Montbenoît, avec comme Président de la république : Mme Georgette Bertin-Pourchet. Cette république «folklorique» possède tous les attributs d'une vraie : ses propres douaniers, son drapeau, son hymne (nous n'échapperons donc pas au contrôle d'identité et à la fouille, surtout la palpation des mollets des femmes... moments de «démence» dans le bus) !

## La Suisse

Passage à pied de la frontière tout près des villages de "Villers-Le-Lac" (France) et "Les Brenets" (Suisse). Visite des moulins à eau souterrains (uniques en Europe), au Col des Roches, à 30 mètres sous terre avec une température de 7°C.
Vallée de la Brévine, aussi nommée "Sibérie suisse". En effet dans cette région, la température peut descendre, en hiver, jusqu'à - 40°C.

# Kiel vojaĝi dank'al la Jarlibro kaj la Pasporta Servo ?



La Internacia lingvo Esperanto ebligas komuniki kun parolantoj de la tuta mondo.
Tiel, fine de januaro 2013, dank'al retadreso aperigita en la "Jarlibro" kaj "Pasporta Servo", Daniel kaj du akompanantoj povis renkonti la tre simpatian sinjoron Jose-Antonio Vergara, kuracisto, kaj lian edzinon Gladys, en Puerto Montt, urbo je la pordoj de la Ĉilia Patagonio.
La akcepto estis tre varmkora je la bus-stacio. La gastiganto vizitigis parton de la urbo, la havenon de Puerto Montt, Puerto Varas...
Vespere, Daniel transdonis plurajn Esperantajn revuojn kiujn li ricevis en sia regiono Allier kaj diversajn objektojn por danki sinjoron Jose-Antonio Vergara (inter aliaj, la Esperanta kaskedo, la rekonigilo). Esperante, ili parolis pri la ekonomio kaj politiko de Latinameriko, pri la vivo de la popolo Mapuĉoj*, pri la multaj kongresoj de Esperanto en kiuj la afabla gastiganto aktivas, antaŭ kvieta nokto en lia domo kaŝita en la ĉiliaj montetoj.

*Por pli scii pri la popolo Mapuĉoj :
http://eo.wikipedia.org/wiki/Mapuĉoj

*Fonto : Esperanto info kaj Daniel. Fotoj : Daniel*




*Jose-Antonio kaj Gladys Vergara*



*Daniel apud belega statuo el ligno de ĉefo Mapuche, ĉe la lago Budi apud Pacifiko.*

## Comment voyager à l'aide du Jarlibro et du Pasporta Servo ?

La langue internationale espéranto permet de communiquer avec des locuteurs du monde entier.
C'est ainsi qu'en janvier 2013, grâce à une adresse internet parue dans le "Jarlibro" et le "Pasporta servo", Daniel a pu rencontrer un fort sympathique espérantiste, José-Antonio Vergara, médecin, ainsi que son épouse Gladys, à Puerto Montt, ville située aux portes de la Patagonie chilienne.
Après un accueil chaleureux à la gare routière, l'hôte fit visiter une partie de la ville, le port de Puerto Montt, Puerto Varas... Lors de la soirée qui suivit, Daniel remit plusieurs revues espérantistes (qu'il reçoit dans sa région, l'Allier) et divers objets pour remercier José-Antonio Vergara (entre autres, la casquette espéranto utilisée comme signe de ralliement). Ils communiquèrent en espéranto sur l'économie et la politique de l'Amérique latine, sur la vie du peuple Mapuche*, sur les nombreux congrès d'espéranto dans lesquels José-Antonio est actif, avant de passer une nuit paisible dans sa maison nichée dans les collines du Chili.

*Pour en savoir plus sur les Mapuche :
http://www.ritimo.org/article538.htm

*Source : Espéranto info et Daniel. Photos : Daniel*

LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE

# Kalendaro

## Selektitaj renkontoj / staĝoj / kongresoj venont-someraj

### Kvinpetalo

Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoir,
FR-86410 Bouresse, Francio
Rete: informoj@kvinpetalo.org

**22 - 23 junio**
**Provludo kaj koncerto de Interkant' pri Karmen', kun apartaj aliĝkondiĉoj.**
Prelego-Koncerto ĉirkaŭ la opero "Karmen" de Bizet estos prezentita de la interregiona koruso "Interkant", kun franclingvaj klarigoj, muziko en Esperanto kaj dancoj. Spektaklo okazos la dimanĉon 23an de junio en la urba festosalono de Bureso. Se vi interesiĝas pri tiu ĉi evento, kontaktiĝu rekte kun Manjo Clopeau, 12 rue de la Drisse, 56450 Theix, 02 97 68 98 57, manjo.clopeau@wanadoo.fr

**12 - 18 julio**
**Muzika staĝo**
Dum tiu ĉi staĝo, Esperanto estos pritraktita kadre de muziko, diversmaniere. Staĝgvidantoj proponos al la staĝantoj diskuttemojn rilataj al muziko. Ĉi jare, ĝenerala temo koncentriĝos ĉirkaŭ originalaj verkoj en Esperanto : kiel statas la movado, kiel ĝi evoluas, kiaj perspektivoj ?
Originalaj verkoj en Esperanto estos prilaboritaj, ne nur kantaj, sed ankaŭ instrumentaj. La staĝo finiĝos per koncerto, kie la staĝantoj prezentos la rezultojn de sia laboro antaŭ loka publiko. La enhavo de la staĝo povas evolui laŭ la personaj petoj kaj emoj de la staĝantoj. Ne necesas esti profesia muzikisto por partopreni. Ankaŭ lingva kurso por komencantoj estas antaŭvidita, paralele al diskutoj en Esperanto pri muzikaj temoj.

**22 - 26 julio**
**Praktikado de la lingvo (1a nivelo)**
Rafaelo estas profesia instruisto de la angla en la hispana publika eduksistemo. De antaŭ 6 jaroj li instruas Esperanton en multaj landoj : Hispanujo, Francujo (en Grezijono kaj Saint-Raphaël), Hungarujo, Ĉinujo (dum ses monatoj, en urboj Baotou, Foshan kaj Kantono), Maroko, Armenujo, Ukrajnujo (en Kievo kaj Jalto), en Turkujo (en Istanbulo kaj Gaziantep). La instrumetodo apartenas al "rekta" vojo sed kun personaj trajtoj.

**22 - 26 julio**
**Praktikado de la lingvo (2a nivelo)**
Josée Lafosse, emerita instruistino, instruas delonge Esperanton. Ŝi gvidis lingvajn kursojn kaj teatrajn laborgrupojn kadre de la Internacia Semajno en Pluezeko, kaj ankaŭ instruis (al komencantoj kaj progresantoj) en Bureso. La staĝo ebligos praktikadon de Esperanto traktante temojn el la ĉiutaga vivo pere de konversacioj, debatetoj, situacioj... Kompreneble estos kantoj, poezio, ludoj… Venu por interŝanĝi, preni kaj doni.

**12 - 17 aŭgusto**
**Promeni tra naturo kaj Vikipedio**
Tiu staĝo havos du aspektojn :
Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj : plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn.
Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn – kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi. Venu do bone ekipite – ŝue, vestaĵe, kaj se eble komputile.
Alain Favre, fungologo

### Diversaĵoj

**15 - 22 junio**
Junia staĝo de Franca Fervojista E-Asocio – en la urbo Chamonix ĉe la Blanka Monto, Francio. Staĝo en 3 niveloj kun marŝado en la valo de Chamonix. Inf.: Fervojista sekcio en Lyon, Pascale Voldoire, allée du Coteau, FR-69530 Brignais, **Francio**.
Rete: uaicl.afcesperanto@orange.fr

**5 - 12 julio**
Internaciaj Esperanto-kursoj (niveloj A1-C1), rostadfesto - 7 jaroj en Herzberg - la Esperanto-urbo. Inf.: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo, **Germanio**. Tel.: +49(0)5521-5983
Rete: esperanto-zentrum@web.de

**28 julio - 4 aŭgusto**
86-a Kongreso de SAT – en Madrido, Hispanio. Soci-politikaj debatoj, kulturaj programeroj, koncertoj, teatraĵoj, vizitoj al Madrido kaj Toledo. Colegio Mayor San Juan Evangelista. Inf: SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda, Asociación Izquierda y Esperanto - SATeH Apartado de correos 8537 ES-28080 Madrid, **Hispanio**. Rete: esperanto@nodo50.org

**3 - 10 aŭgusto**
80-a Itala Esperanto-Kongreso – en Castellaro apud San Remo, **Italio**. Pensu pri io meze inter la kleriga parto de la UK kaj la ekskursoj de la UK, meksika festo, feriaj kluboj ĉe la maro Mediteraneo kaj festivalo de Esperanto-muziko kun rimarkinda junulara partopreno kaj etoso.

## Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon

La franca Esperanto-kastelo Greziljono invitas vin al interesaj semajnoj :
**somera programo** (semajnoj turisma, artamatora, alternativa, infana, teatra),
**aŭtuna feriado** oktobrofine
kaj al **jarfina festego** kun novjara festeno.

Vidu detalon rete en www.gresillon.org/somero
aŭ gresillon.org/agendo
Kontaktu nin telefone al +33-2.41.89.10.34
aŭ retletere al kastelo@gresillon.org
aŭ letere al MCE Gresillon, St.Martin d'Arcé,
49150 Baugé en Anjou, France





Le château d'espéranto de Grésillon vous invite pour des semaines passionnantes :
**programme d'été** (semaines touristique, artistes amateurs, alternative, pour enfants, théâtre),
**vacances d'automne** (fin d'octobre)
et **fin d'année** avec réveillon.

Voir les détails en ligne dans www.gresillon.org/ete
ou gresillon.org/agenda
Contactez-nous par téléphone au 02.41.89.10.34
ou pour courriel à kastelo@gresillon.org
ou par courrier à MCE Gresillon, St.Martin d'Arcé, 49150 Baugé en Anjou

### *Nous contacter*

**Centre Culturel Angevin d'Espéranto**
41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers
Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

### *Vous informer*

**www.esperanto-angers**
www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org
www.uea.org, www.esperanto.net

Kunhelpis al tiu eldonaĵo : Geneviève Gourichon, Jean-Yves Grille, Pierre Jagueneau, Jeanik Marolleau, Laurent Vignaud.